# Doktrino kaj Interligoj 165

*Dum tri jaroj la eklezio preĝeme studis la vortojn de konsilo donitajn en 2013. La Sankta Spirito konfirmas ke ĝi estus benita por konsideri kaj aldoni tiun konsilon al la Doktrino kaj Interligoj. Tiu-ĉi dokumento humile kontribuas al tiu celo kiel esprimo de nia amata principo de Daŭriga Revelacio.*

*Preparante la finan dokumenton, mi konsideris pli da dia direkto kio povus profundigi eklezian komprenon, nun aŭ en la estonteco. Gvidado plibonigis kelkajn frazojn. Kelkfoje, ĝi ankaŭ aldonis enhavon pro kialoj kiuj estas konataj al Dio.*

*Mi ankaŭ preĝeme konsideris, kiuj partoj de la vortoj de konsilo specife aplikis al la tempo kiam ili estis donitaj kaj ne necese devas esti en la Doktrino kaj Interligoj. Do, kelkaj frazoj estis forigitaj. Tiuj frazoj aŭ plenumis ĝiajn celojn, aŭ iliaj konceptoj estas sufiĉe esprimataj en aliaj partoj de la Doktrino kaj Interligoj.*

*La ateston kion mi proponas, certigas ke Dio, la Eternulo, amate kaj pacience gvidas la eklezion pro diaj kialoj. Ni estu dankemaj pro tiu gvidado. Ĝi estu vojo de lumo kaj espero al ĉiuj kiuj volas sekvi la volon de Dio.*

*Al la konsilaroj, kvorumoj, kaj ordoj, al la Mond-Konferenco, kaj al la eklezio:*

1 a. Komunumo de Kristo, dia vizio troviĝas antaŭ vi. Ĝi prezentiĝis dum jaroj per diversaj inspiraj frazoj kaj simboloj, kaj nun estas esprimata per iniciatoj, en harmonio kun la misio de Jesuo kristo.

b. Kiel spirita vojaĝo, kuraĝe sekvu la iniciatojn en la koron de la Dia vizio pri la eklezio kaj la kreaĵo. Tiam, respondante al kreskanta kompreno pri la Dia naturo kaj volo, daŭre starigu komunumojn kiuj travivas la amon kaj mision de Kristo.

c. Ame invitu aliajn pro sperti la bonan novaĵon de nova vivo en komuno kun Kristo. Ŝancoj abundas en viaj ĉiutagaj vivoj se vi elektas vidi ilin.

d. Agadu kompateme kaj ĝuste por forigi malriĉecon kaj nenecesan suferadon. Persvadu pacon sur kaj pro la Tero.

e. Lasu nenion apartigi vin de tiu-ĉi misio. Ĝi malkaŝas dian celon pri individua, socia, kaj ekologia savo; plenecan evangelian ateston pro restorigo de kreaĵo.

f. Daûre konformigu viajn prioritatojn kun lokaj kaj tutmondaj ekleziaj klopodoj pro antaŭenigi iniciatojn. Pliaj pioniraj alproksimiĝoj pro kunordigi congregacian vivon kaj subtenantajn grupojn de disĉiploj estas bezonataj pro trakti misiajn ŝancojn en ŝanĝita mondo.

2 a. Liberigu la plenan kapablon de la misio de Kristo per malavareco kio imitas la malavarecon de Dio.

b. Aŭskultu la atestojn de tiuj kiuj respondas malavarece. Sekvu la deziron de via animo pro hejmeniri al la Dia graco kaj malavareco. Lasu ke dankemo montras la vojon.

c. Memoru, baza disĉipleca principo kreskigas la mision de Kristo per lokaj kaj tutmondaj dek-procentaj donacoj laŭ vera kapablo. Donaci al aliaj valoraj organizoj, kvankam grava parto de Disĉipla Malavara Respondo, ne devus malpliigi aŭ anstataŭigi dek-procentajn donacojn.

d. Dek-procentaj donacoj estas afero kio montras volontecon pro donaci ĉian dimension de la vivo al Dio. Kiam difinita per fido, amo, kaj esperplena planado, inkluzive solvo pro malprudenta ŝuldo, la kapablo por respondi pligrandiĝas multe pli ol oni komence supozis.

e. Stevardeco kiel respondo al la misio de Kristo estas pli ol individua donacado. Ĝi inkludas malavarecon de congregacioj kaj jurisdikcioj kiuj donacas al tutmondaj misioj de la eklezio pro fortigi komunumon en Kristo en ĉiuj nacioj.

f. Kunhavigi pro la komuna bono estas la spirito de Ciono.

3 a. Pli profunde solidarigu vian unuecon kaj egalecon en Jesuo Kristo. Unueco kaj egaleco en Kristo estu realigitaj per la akvoj de bapto, konfirmitaj per la Sankta Spirito, kaj subtenataj per la sakramento de la Komuneco. Ĉirkaŭbraku la plenan signifon de tiuj ĉi sakramentoj kaj kunigu en Kristo kiel neniam antaŭe.

b. Tamen, ĝi ne estas ĝusta deklari unuecon kaj egalecon en Kristo per sakramentaj interligoj kaj poste nei ilin per vorto aŭ ago. Tia konduto vundigas la korpon de Kristo kaj neas tion kio eterne establiĝis per la vivo, morto, kaj reviviĝo de Jesuo Kristo.

c. Vi ne plene komprenas multajn interligitajn procezojn de homa kreado. Per sia mirinda komplekseco, kreado produktas diversecon kaj ordon.

d. Ne estu konsumita kun maltrankvilo pri varieco de homaj tipoj kaj karakterizaĵoj kiel vi vidas ilin. Pasie maltrankvilĝu pro starigo de inkluzivaj komunumoj de amo, unueco, kaj egaleco kiuj montras Dian naturon.

e. Unueco kaj egaleco en Kristo ne signifas uniformecon. Ĝi signifas Unuecon en Diverseco kaj rilatas per Krista amo al cirkunstancoj de aliaj kvazaŭ ili apartenas al ni mem. Ili ankaŭ signifas plenan ŝancon al homoj pro sperti homan valoron kaj rilatajn rajtojn, kun esprimo de talento donita de Dio, en la eklezio kaj socio.

4 a. Rilate pastreco, Dio alvokas tiujn kiujn Dio alvokas el dediĉaj disĉiploj, laŭ iliaj talentoj, pro servi kaj atingi la tutan homaron.

b. Pastrecaj regularoj, disvolvitaj per saĝo kaj inspiro, provizas klaran vojon al disĉiploj pro respondi al alvoko. Ili ankaŭ difinas diferencon inter senco de potencialo kaj la neceso pro ligi al vivo kun principoj de morala konduto kaj rilatoj kiuj promocias bonfaron de la eklezia komunumo.

5 a. Spirita kresko kaj gvido riĉigas partoprenon en la misio de Kristo. Prezidanta evangeliisto kaj la Ordo de Evangeliistoj, kun iliaj kolegoj en la servado, devus fokusi pri spiritece starigi komunumojn de disĉiploj kaj serĉistoj kiuj vivas profunde kaj malavarece en la Spirito de Kristo.

b. Oferu la sakramenton de evangeliista beno ne nur al individuoj kaj congregacioj, sed ankaŭ al familioj,  domujoj, kaj grupoj kiuj serĉas spiritan gvidon pro pri profunde sindonaci al la misio de Kristo. Nenion en tiu-ĉi instruo oni komprenu kiel malpliiĝon de graveco de la sakramento de evangeliista beno pro individuoj.

6 a. Amata Komunumo de Kristo, ne nur parolu kaj kantu pri Ciono. Vivu, amu, kaj kunhavigu kiel Ciono: tiuj kiuj strebas videble unuiĝi en Kristo, inter kiuj ne estas malriĉaj aŭ subpremataj.

b. Kiel korpo de Kristo, ame kaj pacience portu la pezon de kritiko de tiuj kiuj hezitas respondi al la dia vizio de homa valoro kaj egaleco en Kristo. Tiu-ĉi pezo kaj beno estas via pro diaj celoj.

c. Kaj ĉiam memoru, la vojo de sufero kio kondukas al la kruco ankaŭ kondukas al reviviĝo kaj eterna vivo en la eterna komunumo de Kristo de unueco kaj paco. Fidu pri tiu-ĉi promeso.

Stephen M. Veazey

prezidanto de la eklezio